

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 07/01/2021 Kvincentdekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **873,300** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **289,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **220,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **217,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **47,300** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde majo 2021)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 17 DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).



N.ro 17 de "Por Komencantoj".

Ĵussemajne ni konstruis el la Aktiva Voĉo ("La knabino lavas la ŝtonon") la Pasivan Voĉon "La ŝtono lavatas de la knabino (sur la marbordo)". Notu ke por montri ke oni rigardas la bildon retroe, el la fino malantaŭen, la nova Subjekto perdis la finaĵon "-n", kaj la Verbo ricevis la sufikson "-at-", kaj la antaŭa Subjekto ricevis la prepozicion "de". Ĉiuj esencaj vortoj restis: "la knabino", "bat-", "la ŝtono", kaj "sur la marbordo". Notu ankaŭ ke la gramatika tempo restas la sama: "-as". La vicordo de la frazpartoj adaptiĝis al la vicordo de la direkto de la rigardado.



La malmoderna Pasiva Voĉo de Zamenhof uzis du vortojn, Helpverbon "esti" kaj Adjektivan Participon, kiel jene: "La ŝtono ESTAS LAVATA de la knabino". Tiu ankoraŭ multe uzata Pasiva Voĉo ne estas tute ĝusta, ĉar ekz. en la Preterito, la ordinara pasinta tempo, la Zamenhof'a "La ŝtono estis lavata" la vorto "lavata" signifas "duonvoje en la lavado, *halfway the washing*", ne la tutan agadon. Plej multaj lernolibroj tamen plu instruas la duvortan esprimon de Zamenhof.

Marcel Leereveld.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>



Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko



Dankon al la estraro de AEA pro ĝia laboro en 2020. Malgraŭ la neniam antaŭe spertitaj malfacilaĵoj la asocio estis funkcia, aganta, la esperantistoj "renkontiĝadis", lernis unu de la alia, informiĝadis pri la samideanaro en la mondo.

Havu feliĉan 2021 kaj multajn pliajn sukcesojn en via poresperanta laboro.

Katja Steele



Karaj,

Jen Tintilo (*Jingle bells*) kantita de Esperantistoj el multaj landoj inkluzive

Kajto. <https://www.youtube.com/watch?v=aAugoCcFHCw>

Amike, **Nicole Else**



Pri la antaŭa artikolo de Marcel, **Mia Dio**, en AE511

Kun grandega ĝojo mi atente tralegis la inteligentan artikolon de Marcelo Leereveld la 30-an de decembro 2020 en "Aŭstraliaj Esperantistoj" redaktita de Roger Springer.

Marcelo ne akceptas, ke nur unu Dio sufiĉas. Do, se li preferas kredi je pli ol nur unu Dio, li povas ja provi fari tion, eble tio plifeliĉigas lin. Mi mem, de tempo al tempo, dubas pri la ekzisto de la Diablo, aŭ Satano, kiel verŝajne la plej multaj homoj preferas nomi lin. Se iu devas akcepti la kulpon je la tro multaj krimoj, eĉ militoj, ni ja bezonas Satanon por tio, ĉu ne? Tiuj el ni, tiuj, kiuj opinias sin multe pli inteligentaj ol ni, opinias sin pli necesaj ol ni, pli necesaj tiuj, kiuj ricevas multege da mono farante militon kontraŭ siaj najbaroj, evidente ne sekvas la ordonojn de Dio, ili, ŝajne, preferas sekvi tiujn de Satano. Ili uzas sian aŭtoritatecon por devigi gejunulojn forlasi siajn gepatrojn kaj gefratojn kaj surmeti hontindajn sangokovritajn uniformaĉojn kaj eliri el sia patrolando por detruji la landojn de siaj genajbaroj, ĉar ili estas konvinkitaj, ke ili, kruelaj kiel ili estas, havas la rajton komandi tiujn senkulpajn gejunulojn fari siajn krimojn dum ili mem rajtas resti hejme ĉirkaŭataj de gardistoj, kiuj protektas kaj defendas ilin kontraŭ tio, kio ja devos okazi, ĉar justeco regas ja en ĉiuj niaj universoj. Neniu evitas justecon, neniu.

Tiuj, kiuj detruas la konstruaĵojn de siaj najbaroj, la fabrikojn, malsanejojn, lernejojn, malliberejojn, palacojn kaj kastelojn, mortigas kiun ajn, kiu ne parolas la lingvon de la atakemuloj, devas ja lerni, ke oni ne rajtas sekvi, eĉ ne aŭskulti al la Diablo, la Satano, kies ŝatokupo estas krei malfeliĉon en kiom eble plej multaj landoj en la tuta mondo. Ĉu vi nun scipovas diveni, kial tiom da infanoj naskiĝas kun tiom da malsanoj, kaj kial fakte ni ĉiuj devas vivadi kun tiom da problemoj? Kompreneble, ĉar justeco regas en ĉiuj universoj. Vi simple ricevas nur tion, kion vi meritas. Dio instruas vin. Se Li diras, ke vi ne rajtas mortigi, detruji, mensogi ktp. ktp., tio, kion bedaŭrinde la plej multaj homoj, precipe tiuj, kiuj ne dividas sian monon kun la malriĉuloj, tiuj kiuj ĝojas ordoni al la malriĉuloj tion, kion ili volas, ke ni faru, ĉar

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

mem ili ja ne volas fari ion ajn. Mi ne dubas, ke vi ne scias, pri kiuj mi parolas! Sed, jen nur unu ekzemplo: Se Dio estas dirinta, ke ni ne rajtas mortigi, kaj tiam manĝi la kadavron de nia viktimo, tiam tio ja signifas, ke ankaŭ tiuj, kiuj konsideras sin superaj devas lerni sian lecionon. Do, ĉar la morto tute ne ekzistas, li aŭ ŝi renaskiĝos iam poste, estos resendata al la Tero, sed, tiun fojon ne kiel homo, ĉar li aŭ ŝi ja tute ne kondukis kiel homo, kiam li aŭ ŝi havis la ŝancon. Homo ne sekvas la ordonaĉojn de Satano, sed nur tiujn de Dio. La kompatinda lernanto do revenos al la Tero ne kiel homo, sed kiel besto. Poste iu alia lernanto mortigos lin aŭ ŝin, kaj manĝaĉos lin, aŭ ŝin! **Bob Felby**



Pri la antaŭa artikolo de Marcel, Mia Dio, en AE511

Interesa artikolo ("Mia Dio") de spertega lingvisto kiu amuze kaj ironie reliefigas profundajn pensojn de nia kara samideano, Marcel. Efektive temas pri tre interesa artikolo por maljunaj esperantistoj (kiel li kaj Roger kaj mi) sed por la junularo pli gravas en la dudekunua jarcento koneksoj inter Dio kaj la scienco - miaopinio. Kaj, imagu la protestojn se mi, bahaano, ironie aŭ malironie referencus nekredantojn jene: "tiuj stultaj ateistoj". 😊

Aparte malbonefikaj al la pensmaniero de impresiĝemaj junuloj estas tiuj sciencistoj kiuj al Charles Darwin fingromontris por subteni popularan nocion ke la naturo estas la fonto de ĉio kaj ke do nenio spirita ekzistas, religiuloj estas sekve frenezaj, ofte fanatikaj, kaj ke konsekvence ateismo iluminas la vojon. Kvankam de meza aĝo Darwin estis forlasinta la Unitarisman branĉon de Kristanismo, lia ŝanĝiĝema kredsistemo kaj morala kompasoj neniam konfirmis ateismon nek neis li spiritan dimension de la vivo trovitan ĉe ĉiuj homaj socioj: "... ĉiuj vivantaj aĝoj havas multon komunan, en sia kemia konsisto, iliaj ĝermaj veziketoj, ilia ĉela strukturo, kaj iliaj leĝoj de kresko kaj reprodukto ... Tial mi devas dedukti de analogio, ke probable ĉiuj organikaj estaĵoj, kiuj iam vivis sur ĉi tiu tero, descendis de iu praa formo, EN KIU LA KREINTO EKIS LA VIVON." (Esperantigita kun majuskla emfazo de PD.) Charles Darwin, *La Origino de Specioj*, Eldono 2, paĝo 484. Konsideru la hipokritecon (kaj kiel tio evoluis!) de nia nuna mondo en kiu milionoj da junuloj erare opinias eĉ en la nuntempo ke profesoro Darwin estas la patro de ateismo! En ĉiuj eldonoj, kvankam tiuj varias koncerne Darwinajn komentojn pri la Kreinto, la ĉi supraj vortoj de tiu famulo en kiuj li fermas sian ŝlosilan ĉapitron titolitan *Rekapitulado kaj Konkludo* [anglalingve: *Recapitulation and Conclusion*] plej bone estas taksitaj en sendependa enketo pri la vero, anstataŭ fidi vidpunktojn de spertaj lingvistoj aŭ adeptoj de religioj aŭ ateismaj sciencistoj kies famo dependas de libro-vendoj kaj televid-programoj.

Amike Paulo (ne la Apostolo)

Paulo Desailly



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Viaj Dioj kaj mia Dio.

MIA DIO.

Pasintsemajnan artikolon mi publikigis por du celoj: **Unue** por montri la strangan ideon verki pri vera aŭ imagita Dio dum mi atendis la finon de mia vivo. Mi nun ne memoras, ĉu mi kredis aŭ ne kion mi tiam verkis. Sed mi nun certe ne kredas tiun "rakonton". **Due** mi



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

publikigis ĝin por aŭdi ĉu estas aliaj personoj kiuj havas similan Dion, kaj ankaŭ por igi la legantojn pensi pri la ebleco de kruela Dio ĉiopova. Mia “rakonto” priskribas, kiel mi vidus Dion se ial mi decidus ekkredi en veran Dion. Mi neniel intencis, nek intencas polemiki pri la verŝajnoj de religioj nek de dioj. Tial mi samopinias kaj trovas klera tion kion la neapostola Paŭlo respondis, sed nur ĝis lia (*out of the blue*, el la bluo) “EN KIU LA KREINTO KREIS LA VIVON” (kvankam mi neniel intencis esti ironia). La resto de lia respondo temas nur pri ĉu ekzistas Dio aŭ ne kaj mi neniel volis nek volas diskuti tion nun kaj verŝajne neniam. Mi lasas la religion kaj la eventualan ekziston de dio al ĉiu leganto private mem decidi, kiel privatan aferon, same kiel mi ne volas diskuti viajn amajn sentojn.

Sed Paŭlo neniel respondas al miaj zorgoj, nome ĉu Dio estas aŭ estus vere ĉiopova kaj ĉu Li estas aŭ estus kruela. Homoj ja devas havi opinion pri tioj. Aŭ tioj ne gravas al oni. Paŭlo nenion diras pri tioj. Do kial ne? Nenion alian mi petis. **Marcel Leereveld.**

ĈU VI KONAS VIAN ANGLAN ?

Etnaj lingvoj, kaj specialege la angla, havas multe pli da simplaj vortoj ol Esperanto. Estas interesa trovi, ke mankas unu vorto en la germana, nederlanda, franca, kaj eĉ angla por la signifo de la SINGULARA INDIKA PRONOMO POR PERSONOJ. En Esperanto ĝi estas la substantiveca “tiu”. Por la Pluralo ĝi estas la substantivecaj “tiuj” kaj “those”, En la franca oni havas ok da ili: *celui-ci*, *celui-là*, *celle-ci/là*, *ceux-ci/là*, *celles-ci/là* Sed en neniuj el tiuj lingvoj, escepte de Esperanto, ekzistas vorto por la substantiveca “tiu”, kiel en “Rigardu TIUN! Mi timas TIUN. TIU aspektas malsana.” Kompreneble oni povas esprimi la signifon de tiu Pronomo, sed ne per unu vorto. En la angla oni diras “*he or she*” aŭ “*that person*”, aŭ ian alian kombinon de pli ol unu vorto.

En Esperanto la vorto “pronomo” ne nur signifas “komuna vorteto anstataŭ substantivo”, sed “komuna vorteto anstataŭ vorto de iu kategorio”. La Pronomoj estas en Esperanto la jenaj:

- 1). (SUBSTANTIVAJ) PERSONAJ PRONOMOJ. Ili estas: Mi, ci, li, ŝi, ĝi, si, ni, vi, ili, oni.
- 2). ADJEKTIVAJ PERSONAJ PRONOMOJ: Mia, cia, lia, ŝia, ĝia, sia, nia, via, ilia, onia.
- 3). SUBSTANTIVAJ INDIKAJ PRONOMOJ: (por personoj:) tiu. (por aferoj:) tio.
- 4). ADJEKTIVAJ INDIKAJ PRONOMOJ: (por personoj kaj aferoj:) tiu.
- 5). SUBSTANTIVAJ RILATAJ PRONOMOJ: (por personoj:) kiu + (por aferoj:) kio.
- 6). ADJEKTIVA RILATA PRONOM: kiu.
- 7). SUBSTANTIVAJ DEMANDAJ PRONOMOJ: (por personoj:) kiu + (por aferoj:) kio.
- 8). ADJEKTIVA DEMANDA PRONOMO: kiu.
- 9). (ADJEKTIVAJ) KVALIFIKAJ PRONOMOJ: kia, tia, ia, ĉia, nenia.
- 10). (ADJEKTIVAJ) POSEDAJ PRONOMOJ: kies, ties, ies, ĉies, nenies.
- 11). (ADVERBAJ) LOKAJ PRONOMOJ: kie, tie, ie, ĉie, nenie.
- 12). (ADVERBAJ) TEMPAJ PRONOMOJ: kiam, tiam, iam, ĉiam, neniam.
- 13). (ADVERBAJ) KAŬZAJ + MOTIVAJ PRONOMOJ: kial, tial, ial, ĉial, nenial.
- 14). (ADVERBAJ) MANIERAJ PRONOMOJ: kiel, tiel, iel, ĉiel, neniel.
- 15). (ADVERBAJ) KVANTAJ PRONOMOJ: kiom, tiom, iom, ĉiom, neniom.

Ili estas en la angla: 1) *I etc.*; 2) *My etc.*; 3) (por personoj:) (singulare:) (ne ekzistas) + (pluralo) *those*; (por aferoj:) *that*. 4) *that + that*.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniuj informis AE

- 5). *who + what.* 6). *which, that.* 7). *who + what.* 8). *which, what.*
 9). *what, what kind of, that kind of, etc.* 10). *whose, etc.*
 11). *where, etc.* 12). *when, etc.* 13). *why, etc.*
 14). *how, etc.* 15). *how much, etc.*

En Esperanto Pronomoj estas radikoj kaj povas, se eblas, ricevi finaĵojn kaj afiksojn kaj fari aliajn vortkunmetojn.

Marcel Leereveld.

Kredo: ne voli scii, kio estas la vero

Roger Springer

Estimataj gekolegoj, Bonvolu aperigi en viaj revuoj kaj bultenoj la rezultojn de la Esperanta literatura konkurso "Hroisto Gorov - Hrima".
 Koran dankon. *Georgi Mihalkov (Julian Modest).*

Vi sukcesas, oni kritikas vin.

Vi estas societema, vi estas kritikata.

Vi estas introvertita, kritikata.

Vi malĝojas, oni kritikas vin.

Vi estas feliĉa, oni kritikas vin.

Vi estas dika, oni kritikas vin.

Vi estas maldika, oni kritikas vin.

Vi estas en rilato, oni kritikas vin.

Vi estas fraŭlo, oni kritikas vin ...

Fakte, kion ajn vi faras, vi estas kritikata ...

Kaj tiam, kiam vi mortas, homoj diras: "Li estis bona homo"!

Moralo: en la vivo, kion ajn vi faras, vi estas kritikata ... do faru ĝin ĉiuokaze!

Ĉesu zorgi, ĉesu aŭskulti aliajn, kaj faru tion, kion via intuo kaj via koro diras al vi fari ...

... kaj fine fariĝas la persono, kiun vi meritas fariĝi !

- Liberigu vin de viaj ĉenoj

Kore, **Honoré Sebuhero** el Norda Kivu / DR Kongo

AEA/NZEA Somerkursaro/Kongreso 9-13 jan 2021

Post du tagoj komencos [nia virtuala somerkursaro/kongreso](#). (9 - 13 januaro 2021)

Ni tre ŝatus, ke vi partoprenu almenaŭ en kelkaj de la diversaj eroj. Ni klopodis kunmeti varian kaj interesan [programon](#).

(Restas kelkaj "truoj" en la programo. Se VI ŝatus prezenti aŭ gvidi sesion, bv informi nin)

[Aliĝu senpage](#), por ke ni povu sendi al vi la ligilojn por la kvin-taga evento.

Ĉiun tagon okazos du-horaj lingvaj lecionoj je tri niveloj. Bv indiki vian elekton. Bv kuraĝigi speciale kelkajn komencantojn partopreni.

Ni tre esperas vidi kaj aŭdi vin sur niaj ekranoj.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Ni ankaŭ petas vin, ke vi plusendu tiun mesaĝon al aliaj esperantistoj tra la mondo.


Plej amike,

Heather, Indrani, Jonathan, Sandor, Terry (AEA-estraro) Bradley, Ivan (NZA-estraranoj)

Unu jaron poste

Ĉi-jare ne multaj homoj venis por tendumi inter Kristnasko kaj la Novjaro sur la rando de la rivero Nariel, ne for de la urbo Corryong, kie kutime okazas festivalo. La kialo ne estis nur la pandemio kaj la proksimeco kun Njusaŭtvelo, tiam laŭleĝe ne plu atingebla ekde kelkaj tagoj, sed la memoro el la pasinta jaro, kiam plejparte de la ĉeestantoj devis lasi ĉion kaj karavane iri for por eviti la fajregon, dum kelkaj restis por protekti la lokon kaj la posedaĵojn de la foririntoj. La fajrego fariĝis la temo de multaj konversacioj. Batali kune kreis pli solidajn amikecojn. Sed iom post iom, malrapide, la naturo resaniĝas, eĉ se la fiŝoj kaj insektoj ankoraŭ ne multas kiel antaŭ la fajro. La vivo daŭras.

Franciska Toubale



Kio estas Mono? Ĉu mono estas la havebla energio en la mondo?

Ĉu homa aŭ besta Laboro? La Suno? Vento? Gravito? ktp. aldonatas ankaŭ la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj Oleo? Gaso? Karbo? Atomo?

Ĉar mono egalas energion ekzistas malmultaj riĉeguloj kiuj nevideble regas la mondon. La bankmono (banknotoj, komputilaj ciferoj) estas ligita al energio, Ili devas egali al energio. Landaj kontekspertizistoj balanciĝas ĝin sed se ne, la inflacio kaj malinflacio kontrolas tion. Do la monda problemo estas kiel ĝuste dividi tiun monon al la Homaro por ke ĉiuj povu vivi feliĉe. Ĉu Universala Pensio? Ĉu vi konsentas??

Roger Springer

World BEYOND War MONDO TRANS MILITO

eĉ aŭstraliaj soldatoj partoprenas en militoj. KIAL??

Ĉu ni ne bezonas la monon por batali la kovid-19 kaj la ekonomiajn problemojn, kiujn ĝi kreas?

Roger Springer



WORLDBEYONDWAR.org

Ĉirkaŭ 2200 aŭstraliaj soldatoj ĝuis Kristnaskon ĉirkaŭ la mondo.

Julian Assange: "ĉar li eble sin mortigus" ne estas devigita iri al usono.

3ZZZ

La elsendo de la 4a de januaro proponas pripensadon pri la historio de Australio kaj pri la pandemio

...**Franciska Toubale**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE